

la 1<sup>an</sup> de Dec. 1925

Kara Amiko,

Jen tiom da semajnoj, ĉu ne, ke mi ricevis vian, kiel ĉiam, tre ĉarman leteron. Vi sendube pensis ke S<sup>ino</sup> Sergeant certe volis imiti vin. Sed, tute ne, mi prokrastis + kiam oni komencas prokrasti, tio estas terura. Oni neniam scias kiam oni finos.

Hodiaŭ, mi pripensis al vi + al via lando, al Praha + al la Praha Kongreso + mi diris ke se mi povus trovi momenton, mi certe skribus al la tiel afabla ~~tehee~~ Ĉeko kiu por mi riprezentis<sup>1</sup> vian belan landon.

Ekstere, pluvegas, ĉio estas nigra tra nebulo + malsekeco; intere<sup>2</sup>, antaŭ miaj okuloj kuŝas via letero + la interesa P.K. el Kutná Hora pri kiu mi vin dankegas. La fraŭlinon dekstre mi rekonas, sed mi ne rememoras kie mi vidis ŝin. Vi demandas ĉu mi vin rekonas? Ĉu vi ne estas rekonebla tuj ĉie + ĉiam? Ĝi devis esti tre simpatia kongreseto. Ĝenerale mi ne ŝatas naciajn Kongresojn. Mankas la medio fremda kiu tiel allogas.

Vi skribas ke eble alia korespondantino ol mi kolerus je via prokrastemeco + ĉesus skribi. Mi ne povus. Al mi estas tro fortaj pasintaj kongresaj impresoj + jaroj de skribado, de korespondeco por agi tiele. Mi estas fidela en ĉio. Kompreneble se iu neniam plu skribas kiel Sveda amiko mia mi devas ĉesi, sed min doloras tiu rompiĝo.

Kiel sukcesas via pian'lernado? Piano (forte-piano) + ne "pianino" laŭ miaj 4 vortaroj. Por vi, tio estas facila, sendube, ĉar vi estas lerta muzikisto. Mia filo tuj kiam li eniras, li ludas ankaŭ, sed li ne lernas. Li nur legas. Li ne havas muzikan orelon. En Boulogne, estas muzikorkestroj sed ne kant'horoj. Oni lernas en la Akademio, sed estas ĉio. Ĉe vi, ĉiuj ŝajnas muzikemaj. Ĉi tie estas malofte. Mi esperas ke S<sup>o</sup> Dalibor Doubek sukcesas + ke li al vi ĉiuj plaĉas.

Pri Edinburgo, mi nenion povas diri. Francujo, ho ve, nuntempe trapasas krizan momenton + la franko malpli + malpli valoras. Nia lando ŝuldas tiom da miliardoj ke oni tute ne scias kiel ilin repagi. Do, ĉu oni havos monon en 1926 aŭ ne? Estas vere malfeliĉe por tiuj kiuj laboris dum 30 jaroj + ŝparis por la maljuneco, vidi sian kapitalon ~~malpli~~ + pli malgrandiĝi + ĉion iĝi pli + pli multekosta.

Se mi ne iros al la Kongreson, mi eble havos iom da konsolo ĉar tiuj kiujn mi ŝatus revidi, eble, trapasos Boulognon + mi, de nove, pasigos kelkajn agrablajn horojn.

Vi miras ke mi memoras tiel detale mian vojaĝon al Praha. Sed mi memoras ĉion + ĉiujn miajn vojaĝojn + spertojn, precipe kiam vojaĝo estas bela + interesplena kiel tiu.

Baldaŭ okazos viaj elektoj + mi pripensos al vi. Mia edzo ŝatas la politikon sed absolute ne havas tempon okupiĝi pri aliaj aferoj ol siaj. Li laboras vespere + la tutan tagon + neniam finas. Li estas tre laca. Nur, dimanĉon, li iras golfejon + lastan dim. estis vere tro ventege + li laboris ankoraŭ. Estas pro tio ke mi tiel ofte estas sola + trovas tempon okupiĝi pri Esp.

Mia filo sukcesos, mi kredas. Li bonege pledas + ĉiuj laŭdas lin. Sed, nuntempe estas tre malfacile por juna advokato havi procesojn krom la ne pagantajn (Assistance judiciaire). Mi aŭdas paroli pri procesoj + leĝoscienco la tutan tagon + je la manĝadoj. Sed, al mi tio plaĉas + mi nune konas multe da leĝoj, k.t.p. Post unu jaro, eble Jacques estos doktoro en leĝoscienco. Li havas ankoraŭ unu

---

<sup>1</sup> ĉu "reprezentas" ?

<sup>2</sup> ĉu "interne" ?

ekzamenon (Marto) + la tezon.

Lastatempe mi vidis: "Les contes d' Hoffman" en la teatro. Tre bone ludita + kantita.

Oni sendis al mi grandan tradukon Esp. de Angla libro (pri lingvoj internaciaj) por ke mi ĝin korektu, estas tre longa laboro, ĉar estis tre malbone farita. Sed, tamen mi tiel ŝatas ĉion kio rilatas al lingvoj ke mi ĝin plezure faris. Kiel mi bedaŭras ne koni vian teruran lingvon. Ĉu ĝi estas pli malfacila ol la pola lingvo?

Estas multaj servistinoj ĉekaj ĉi-tie, polaj ankaŭ. Kelkafoje oni ŝatas ilin, kelkafoje, tute ne.

Nun, kara korespondanto, mi vin forlasas al vi sendante miajn tut'korajn dankojn por viaj leteroj kiuj ĉiam al mi faras la saman grandan plezuron.

Kiseton al Eva + amikajn salutojn al via Edzino + al mi mem.

Alice Sergeant

De kelkaj semajnoj ni travivis terurajn ventegojn malvarmajn. Multaj ŝipoj pereis + estis kruele malvarme pro nordaj ventoj.